



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 31-a jara, n-ro 10

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1967

EN TEL AVIV, ISRAELO

Flugu kun la U.E.A. — karavano !

Eble, multaj el la legantoj jam eksciis pri la preparata U.K. en Tel Aviv. La Loka Kongreso Komitato kaj la Konstanta Kongresa Sekretario jam energie eklaboris por ke tiu kongreso fariĝu neforgesebla.

Plej varme ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj partopreni tiun eventon. Por faciligi tion, U.E.A. organizas internacian karavanon kun 10-taga restado en la kongresurbo, dum restos je dispono post la Kongreso aliaj 10 tagoj por rigardi la landon.

Neniu maltrafu la okazon vidi tiun ĉi unikan, historiplenan, sanktan, romantikan, antikvan kaj samtempe modernegan landon! Iru rigardi la miraklon de la fruktodona verda lando kreita el dezerto, vizitu la bibliajn lokojn, kie ŝvebas ankoraŭ la agordo de la antikveco. Konatiĝu kun la Esperanto-movado en tiu ĉi multlingva lando. Neniam vi havos okazon je pli favoraj kondiĉoj viziti tiun landon!

Datoj de la Kongreso - Pro la specialaj cirkonstacoj en Israelo la Kongreso okazos ne, kiel kutime, de sabato ĝis sabato, sed de merkredo la 2-a de aŭgusto ĝis merkredo la 9-a de aŭgusto 1967.

Forveturo - Ĝi okazos dimanĉon la 30-an de julio 1967. La saman vesperon oni alvenos en Tel Aviv. La morgaŭan tagon oni povos ricevi la kongresajn dokumentojn kaj oni havos 2 tagojn por konatiĝi kun la urbo kaj jam viziti vidindaĵojn antaŭ la Kongreso.

Reveturo - Dimanĉon la 20-an de aŭgusto 1967 oni reflugos el Tel Aviv al Eŭropo. Sekve, oni havos 10 tranoktojn en la hotelo en Tel Aviv, kaj poste 10 tagoj oni restos por vidi la landon.

Postkongresa ekskurso - Por tiuj 10 tagoj tre bela Postkongresa Ekskurso estas planata, dum kiu oni vizitos ĉiujn famajn lokojn. Detaloj pri tiu ekskurso estos publikigitaj kiel eble plej baldaŭ, sed jam ni povas anonci, ke oni konatiĝos i.a. kun Natanija, Haifa, Jerusalem, Nazareth, la lago de Tiberio, la Morta Maro, la Ruĝa Maro ktp.

Dulitaj kaj unulitaj ĉambroj - La ĉi sube indikitaj prezoj por la karavano validas por unu persono, sed antaŭviditaj estas dulitaj ĉambroj. Prefere do oni trovu personon por havi ĉambron kune. Unuopaj personoj, kiuj nepre deziras unulitan ĉambron, devas alpagi ekstran sumon por la tuto. Ankaŭ tio estas ĉi sube indikita.

Proksimunaj prezoj - La indikitajn prezojn oni devas konsideri ne plene definitivaj. Ili estas validaj en la nuna momento, sed, unuflanke, se la nombro de par-

toprenantoj estos granda, verŝajne la prezoj povos iom malaltiĝi; aliflanke, dum unu jaro povos okazi iuj ŝanĝoj en la tarifoj, kiuj nun ankoraŭ ne estas konataj. Komprenible, ni faros ĉion por teni la prezojn kiel eble plej malaltaj.

Vojo - La prezoj validas por la vojlinio Amsterdam - Tel Aviv - Amsterdam.

Ni sukcesis aranĝi, ke la partoprenantoj povos komenci kaj fini la vojaĝon en diversaj urboj de Eŭropo.

U.E.A.-membreco - La partoprenantoj en la karavano devos esti individuaj membroj de U.E.A. en 1966 kaj 1967 (minimume MJ).

Prezoj - La prezoj estas fiksitaj laŭ la jenaj 4 kategorioj de hoteloj:

Kategorio	Baza prezo	Aldono por 1-lita ĉambro
Luksa	1335,— gld	165,— gld
Unuaklasa	1255,— gld	100,— gld
Turistklase	1155,— gld	100,— gld
Triaklasa	995,— gld	85,— gld

En ĉiuj kategorioj la ĉambroj havas banĉambron aŭ duŝon. La luksa kategorio antaŭvidas Hilton-hotelon.

Kio estas inkluzivita - Ni ankoraŭfoje atentigas, ke la menciitaj prezoj inkluzivas krom la flugvojaĝo 10 tranoktojn en hotelo en Tel Aviv kun matenmanĝo kaj servmono, tiel ke tiurilate oni havas plu neniujn elspezojn. Plue, transportojn de personoj kaj valizoj inter flughaveno kaj hoteloj.

Ŝparado - La ŝparsistemo, starigita por la Kongreso en Tokio, validas ankaŭ nun por la Kongreso en Tel Aviv. Oni povas ĉiam malfermi ŝparkonton kaj sendi por ĝi rondajn sumojn. La mono, komprenible, restas posedaĵo de la ŝparanto, kaj se tiu poste ial ne povos vojaĝi, la ŝparita sumo estos je dispono.

Anoncado - Ĉiu, kiu intencas vojaĝi al la Kongreso en Tel Aviv per la flugkaravano de UEA, bonvolu anonci sin kiel eble plej baldaŭ ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.

Estas klare, ke ni povos atingi la plej favorajn kondiĉojn, se ni baldaŭ havos impreson pri la nombro de interesitoj. Tiuj, kiuj jam definitive decidis kaj antaŭpagas 20% de la vojaĝsumo, estos registritaj kiel partoprenantoj kaj povos esti tute certaj pri sia loko en la karavano.

Ni varme rekomendas al ĉiuj kapti la unikan okazon vidi tiun eksterordinare

EL LA SEKCIOJ.

FERIOSEMAJNO KROMMENIE

14-22 AŬGUSTO 1966

Dum 10 tagoj Esperantistoj el 7 diversaj landoj (Kongo, Svedujo, Ĉeĥoslovakujo, Belgujo, Francujo, Anglujo kaj Germanujo) estis gastoj de la grupo „Unueco” en Krommenie, kiu dum tiu semajno nomiĝis Esperodam.

La organizado de la semajno estis vere modela kaj precipe s-ino Van der Meulen meritas plenan laŭdon.

Dum la interkonatiĝvespero, lunde, la gastoj konatiĝis inter si kaj kun la gegastigantoj. Dum la sekvantaj tagoj oni vizitis, sub bonega gvidado de s-ro Fischer, la tutan provincon Nord-Holando: Enkhuizen, Hoorn, Alkmaar, Marken kaj Volendam, Amsterdam, IJmuiden.

Ĉiuvespere oni revenis sufiĉe frue kaj estis individue invitita ĉe alia familio. Precipe tio donis okazon starigi amason da amikaj rilatoj.

Sabate sekvis adiaŭa festo kaj internacia balo.

Certe neniu el la gastoj baldaŭ forgesos Esperodam!

Al ĉiu kiu volas foje travivi veran Esperantisman etoson mi konsilas, ke li enskribu por la venontjara 15-a feriosemajno en Krommenie.

Petro, unu el la ĉeestantoj.

Al ĉi tiu raporto la estraro de „Unueco” aldonas: „Ni ne volas preterlasi ĉi tiun okazon por ankoraŭfoje esprimi nian dankon al la gegastigantoj pro ilia sindonaj kaj sinceraj helpoj. Ĉar vi ĉiuj ebligis kaj ebligis ĉi tiun semajnon.

Ĝis nia 15-a”.

La estraro de „Unueco”.

(sekr.: S-ino J. A. van der Meulenvan Harten, Popelstraat 13, KROMMENIE, Nederlando).

interesan landon. Laŭ la raporto de s-ro Pompilio, KKS, kiu pasigis tie tri semajnojn por fari la unuajn aranĝojn, estas jam tute klare, ke oni travivos neforgeseblan tempon en tiu lando plena de kontrastoj, kie je ĉiu paŝo oni renkontas kaj antikvan historion kaj modernan progreson.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ESPERANTO-MONUMENTO

ĉe Zamenhofdreef en Utrecht inaŭgurita

Proksimume 200 geesperantistoj sin kolektis la 3-an de septembro ĉirkaŭ herbe borderita placeto ĉe la Zamenhofdreef en la kvartalo „Overvecht”, Utrecht, por festi la inaŭguron de Esperanto-monumento. Post kiam la urbestro kaj kelkaj oficialuloj estis akceptitaj en la apuda restoracio de la „Bodencentrum”, oni promenis al la per flagoj ornamita loko. Sinjoro G. C. de Greef, prezidanto de la Utreĥta Esperanto Komitato, en sia bonveniga parolado priskribis la persistan laboron de la komitato ek de la kresko de la ideo ĝis la finfina efektiviĝo. Post tio li petis la urbestron de la urbo Utrecht, jhr. mr. C. J. A. de Ranitz, malkovri la monumenton kaj transpreni ĝin de la komitato. Helpe de du ĉarmaj knabinoj la urbestro plenumis la solenaĵon dum fioreto de geknaboj kantis la unuan strofon de „La Espero”.

Kvankam la urbestro konfesis, ke li ankoraŭ ne estas plene konvinkita pri la utilo de Esperanto, li dediĉis multajn afablajn vortojn al la Utreĥta komitato, laŭdis la belecon de la monumento kaj komunikis, ke la komitato estas akceptita kiel „kultura” unuiĝo. El financa vidpunkto tre favora situacio! Fine li transprenis monumenton por la urbo.

Posttagmeze okazis en la „N.V.-domo”, Oudegracht, agrabla kunesto kaj estis okazo por gratuli. Inter la multaj parolantoj sin trovis nia aŭstra samideano Sinjoro Johann Geroldinger, la iniciatinto de la monumento de Linz, kiu estis inaŭgurita pasintjare. La longa vico de parolantoj estis agrable interrompita de dancetoj kaj kantoj de la geknaba fioreto sub gvido de S-ro Veldhuizen, instruisto ĉe unu el la lernejoj en la kvartalo „Overvecht”, kaj deklamado de S-ro Leenhardt el Oegstgeest.

La komitato povas esti kontenta pri la rezultato de sia laboro kaj meritas la laŭdon de ni ĉiuj.

R. S.

„MERKURIO” 60-JARA

La venontan 22-an de oktobro festos la L.E.E.N.-sekcio en Rotterdam „Merkurio”, sian diamantan jubileon.

En tiu tago la societo okazigos akcepton en la salono „Irene” de Restoracio Engels, en Groothandelsgebouw (proksime

al la Centra Stacidomo), je la 16-a horo. En tiu akcepto ĉiuj geamikoj estos bonvenaj.

Post la akcepto kaj intima kunestado okazos bankedo, kiu komenciĝos je la 19-a horo. Por la bankedo ĉiu povas anonci sin. (Pri la kondiĉoj informiĝu ĉe via sekretario, kiu ricevos ĉirkuleron, aŭ ĉe la kasistino de „Merkurio”: s-ino A. B. M. Coppens-Bink, Statenweg 52, Rotterdam-4 (tel. 0 10-286145).

En tiu ĉi jubilea festo estos prezentata al la publiko la unua turisma faldfolio aperinta en Esperanto pri la urbo Rotterdam. Tio ĉi estas per si mem jam grava evento por la Esperanto-movado kaj ĝia prezento al la publiko certe helpos brili la jubilean feston de „Merkurio” kaj doni novan impulson al la disvastigo de Esperanto en Rotterdam.

Venu multnombre kaj helpu krei bonan etoson en nia festo!

LE ESTRARO DE „MERKURIO”

Sekcio Groningen.

Sekr.: Bosboom Toussaintstraat 21.

En septembro s-ino L. de Vries-Kanning memorigis la tagon, ke ŝi antaŭ kvardek jaroj fariĝis Esperantistino. Tial la estraro decidis nomi ŝin honora membrino de la sekcio Groningen.

Laŭ propono de la prezidanto ni ciklostilos skriban Esperanto-kurson, ĉiam uzoblan, se iu deziras lerni E. Ni povas presigi anoncon en diversaj ĵurnaloj por atentigi la homojn.

Sekcio Hago.

Sekr.: Van Trigstraat 20.

Krom du aliaj kunvenoj, en kiuj S-ro A. Bloemhard rakontis pri la lerneja konferenco en Grasz kaj S-ino E. Kervers pri la U.K. en Budapeŝt, ankaŭ okazis la 14-an de septembro propaganda vespero por ne-esperantistoj en nia propra ejo. La salono estis plena.

S-ro A. Bloemhard malfermis kaj S-ino E. Kervers fervore propagandis esperanton. La infanoj de S-ino J. Carli kantis kelkajn ĉarmajn kantojn kaj poste S-ro F. Kokken donis provlecionon. S-ro F. Bettink vidigis al ni lumbildojn pri diversaj renkontiĝoj en Esperantujo. Sukceson havis la vespero, ĉar anoncis sin 14 novaj kursanoj kaj kelkaj volas ankoraŭ priensi. Kontentiga vespero!

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Duonoficiale ni menciis en nia societa gazeteto „Sub La Verda Stelo” pri kunveno okazonta komence de oktobro. Pro ne antaŭviditaj cirkonstancoj ni devas ŝanĝi la daton. Tial do ni petas la atenton por la distra kunveno, kiu okazos lundvesperon la 17-an de oktobro en „De Harmonie” Rustenburg 71 C. Zaandam. Per aparta cirkulero ni ankoraŭ informos pri la kompleta programo.

Novajoj el la Esperanto-movado por blinduloj.

La konata porknaba blindulinstituto St.-Henricus en Grave estas translokigita al moderna, tre bone instalita instituto en Nimego (Nijmegen). La brajla „Le Sage ten Broek-biblioteko” kun vasta fako de esperantaj verkoj kaj sonbenda fako, same kun multaj esperantaj verkoj, troviĝintaj en St.-Henricus, estas transportitaj al aparta ejo en Nimego, Panovenlaan 1. La estraro de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) estas preparanta du por ni gravajn eldonaĵojn: ĝeneralan adresaron de ĉiuj blindaj esperantistoj en la tuta mondo, kaj kompletan katalogon de esperantaj brajlaj libroj kaj sonbendoj en porblindulaj bibliotekoj en la diversaj landoj.

Se anoncos sin sufiĉe multe da aĉetontoj ĝi intencas en brajlo eldoni la novan eldonon de „Lingvaj respondoj” de d-ro Zamenhof.

Pro abundo da materialo por „N.E.” la redaktoro petas insiste redakti ensendotajn artikolojn, informojn k.t.p. kiel eble plej koncize. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto. Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redaktoron antaŭ la 10-a de la antaŭa monato.

La Redaktoro.

Esperanto en Komerco - kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2.—, ekde 10 libroj gm. 1.35.
Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

**REZULTO EKZAMENO
ESPERANTO L.O. 1966.**

	<i>numero da kandidatoj:</i>
Anoncis sin	7
Partoprenis	7
Malsukcesis post la skriba parto	3
	—
	4
Malsukcesis post la buŝa parto (kun re-ekzameno en decembro 1966)	1
	—
Sukcesis:	3

Nomoj de la sukcesintoj:

S-ino E. Kervers-van Tholen, Hago.
S-ro H. J. Appelo, Alphen aan de Rijn.
S-ro P. J. van Tol, Wormer.

**DIAPOZITIVOJ PRI TURKU
(FINNLANDO)**

La bela serio da diapozitivaj kun tre klara sonbendo (rap. 9,5/sec.) estas denove en Nederlando.

Tiuj grupoj, kiuj ankoraŭ ne uzis ĝin, kaptu la okazon plenumi interesan, duonan, klubvesperon.

Por ke mi povos kompili taŭgan „rondvojaĝon” de la pakajo, vi skribu tuj al la sekretariino de „Merkurio”, Willem Nagellaan 16, Rotterdam-13.

La U.K. en Budapeŝto.

La 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto kun pli ol 400 kongresanoj estis la plej granda postmilita kongreso.

Bedaŭrinde ni pro diversaj kialoj, i.a. manko da loko, ne povas detale raportiti. Ni referencas al artikoloj en aliaj Esperantoj-organoj, i.a. „Esperanto” de UEA kaj „Heroldo de Esperanto” de 1 sept. 1966.

Grandan sukceson rikoltis la geaktoroj de la Arta Festivalo, kiuj i.a. ludis „La holanda pupo”, vodevilon de Julio Baghy, kun muziko de M. Sarosi.

La akceptitan rezolucion ni jam publikigis en la septembra numero.

En la Belarta Konkurso nia samlandano Wouter Pilger gajnis en la fako Originala Poezio la unuan premion pro sia kontribuaĵo „Hiroŝige” kaj same la unuan premion en la fako Tradukita poezio pro „Balado de kontraŭdiroj” de François Villon (1431 - post 1463).

JARRAPORTO DE F.E.N. PRI 1965

Kvankam ankaŭ en 1965 eksteren la agado de FEN ne tiris multe da atento, la pasintan jaron diversaj laboroj estas plenumataj kaj plenumitaj. Diversaj komisionoj povis esti instalataj, kiuj esploras en diversajn direktojn pri la eblecoj de ĝenerala propagando je plej diversaj terenoj. Al la petskribagado de UEA, koncerne la U.N. la kernestraro de FEN donis sian plenan kunlaboron. Multaj leteroj al gravaj personoj estas ekspeditaj; bedaŭrinde nur malgranda parto revenis kun la petita subskribo.

Tamen kvankam ne el vidpunkto de la amplekso, nia laboro estis tre grava el la vidpunkto de la graveco de la subskribintaj personoj (parlamentanoj, senatanoj, profesoroj ktp.).

La eldono de komuna propaganda gazeto montriĝis ne jam ebla pro la manko de la bezonataj anoncoj en ĝi, el kiuj grava parto de la bezonata monsumo devus esti ĉerpata.

La eldono de komuna studgazeto trovis nur ĉe 4 el la en FEN kunlaborantaj organizoj entuziasmon. Tia eldono tamen eblas nur se la nombro da abonantoj estas sufiĉe granda.

En la pasinta laborjaro okazis kunveno en la kadro de FEN kun la diversaj libroservantoj por esplori la eblecojn de pli firma kunlaboro inter la diversaj libroservoj. Kiel unu el la rezultoj estu menciata la plano eldoni komunan katalogon.

ŜIPA KARAVANO AL TEL-AVIV.

S-ro René Llech-Walter, prezidanto de U.F.E., iniciatas, kun la helpo de agentejo en Perpignan, krozadon al Universala Kongreso de Tel-Aviv.

La gesamideanoj kiuj ne ŝatas vojaĝi aviadile povos ĝui la plezuron de ŝipa veturado.

Sur la ŝipo okazos kursoj por komencantoj, konversaciaj kursoj, interesaj prelegoj, koncertoj, kino, dancoj, k.t.p.

La boato foriros el Marsejlo la 25-an de julio kaj revenos ĉe la sama haveno la 16-an de aŭgusto.

Oni antaŭvidas haltojn en Napolo, Ateno, Cipro kaj diversajn ekskursojn en Israelo. Detalajn informojn sendos S-ro Llech-Walter, 5, quai Vauban - 66, Perpignan (Francujo) kontraŭ respondkupono.

Instaligis komisiono „Esperanto en industrio kaj komerco”, en kiu sinjoroj Bakker kaj Munninksma - se eble en kunlaboro kun sinjoro Wensing - esploras la eblecojn por FEN je tiu speciala tereno. La komisiono de informado, kies unua kunveno jam okazis, ne jam trovis sian ĝustan formon.

En la pasinta jaro la kernestraro okupis sin pri la t.n. plano „Malmgren” kaj trovis ĉe la koncernaj aŭtoritatoj simpatian por tiu plano. La afero estas nun en stadio ke FEN ne plu povas fari ion en tiu direkto. La kompilo de nova regularo por la Ekzamena Komitato ne jam povis fine okazi.

El nia kontakto kun TELEAC ne jam kreskis io pozitiva. La programoj por tre longa periodo estas jam pretaj kaj provizore ne eblas enmeti en ili Esperanton.

La Radio-Servo de FEN ankaŭ en 1965 daŭrigis sian laboron.

Grava perdo estis la morto de ĝia fidela prizorganto, sinjoro S. S. de Jong Dzn, je la 23-a de julio 1965. Feliĉe ni trovis en sinjoro W. Böttcher taŭgan anstataŭanton.

La kernestraro konsistis dum la pasinta laborjaro el:

Mag. F. Winkel (prezidanto);
A. M. D. Korff (sekretario);
Drs. J. P. Lok (kasisto);
W. Krikke (vic-prezidanto).

A. M. D. Korff.

(Vidu ankaŭ p. 90).

**MILIONO DA VOĈOJ POR
ESPERANTO.**

Preskaŭ unu miliono da individuaj personoj subskribis proponon, kiun Universala Esperanto-Asocio prezentos en oktobro al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi petas Unuiĝintajn Naciojn solvi la mondan lingvan problemon per helpo al la Internacia Lingvo Esperanto.

Inter la ĉefaj subskriboj por la Propono, kiun solene transdonos en Nov-Jorko sespersona delegacio, troviĝas tiuj de la Prezidanto de Aŭstrujo, de la ĉefministroj de Danlando, Islando kaj Norvegujo, de la Prezidanto de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (Komuna Merkato) kaj de aro da aliaj elstaraj publikaj figuroj. Krome apogas la Proponon preskaŭ 4000 organizoj kun entute pli ol 70 milionoj da membroj.

FINANCA JARRAPORTO F.E.N. 1965

Kaso	f	6,26
Ĝirkonto	f	1292,20
	f	1298,46
Medikamenta fonduso	f	83,93
Pagotaj kostoj	f	409,51
Kapitalo	f	805,02
	f	1298,46
Saldo 1-1-1965	f	748,—
Kotizoj	f	1260,—
	f	2008,30
Radio-Servo	f	149,20
Ekzamena komitato	f	75,—
Kostoj de la estraro	f	85,10
Medikamenta fonduso	f	14,10
Administrataj kostoj	f	277,44
Propagando	f	109,—
Saldo	f	1298,46
	f	2008,30

Drs. J. P. Lok.

Noto de la redaktoro:

La jarraporto de F.E.N. aperas ĉi tie kun prokrasto. Verŝajne pro miskompreno ni ne ricevis ĝin persone. Por tamen publikigi ĝin ni transprenis la raporton el alia fonto.

SCIIGOJ DE LA RADIO-SERVO DE F.E.N.

Estas malĝojigaj aferoj, pri kiuj ni devas atentigi vin.

1. La N.C.R.V. ĉesigis la elsendojn „La Evangelio en Esperanto”, kiuj okazis la unuan lundon de ĉiu monato en la daŭro de precize 20 jaroj (okt. 1946 ĝis inkl. sept. 1966). La nova aranĝo, laŭ kiu la radio-unuigoj disponas pri malpli da sendtempo, estas la kaŭzo, ke oni eligis diversajn rubrikojn, i.a. la Esperantan.
2. La V.A.R.A. faris same kun la elsendoj de „Socialistaj informoj en Esperanto” je vendredvespero. La lasta okazis la 30-an de septembro.
3. La A.V.R.O. ĉesigis ek de septembro la anoncion en la AVRO-bode de la ĉiulandaj Esperanto-elsendoj. La motivo estas: nova aranĝo de la tekstoj. Klopodoj niaflanke rilate al enpresigo de konciza superirigardo de ondolongoj kaj tempoj ankaŭ ne havis sukceson. Ĉiu abonanto je la AVRO-bode esprimu al la redakcio sian grandan bedaŭron pro la estonta manko, tiel ke oni konstatu, ke

TRA LA LIBRARO.

SENNACIECA REVUO jaro 1966, eldonata kaj redaktata de S.A.T., Paris. Kajero, formato 17 x 22½ cm, 57 paĝoj kun ilustraĵoj. Prezo f 3,30.

Ne ĉiam la enhavo de la jam klasikaj revuoj de S.A.T. estas egalkvalitaj. Por la redakcio ja validas, ke ĝia laboro dependas de la alsenditaj kontribuoj kaj por la leganto, ĉu tiuj lastaj estas laŭ lia gusto. Miaopinie ĉi-jare la variaj artikoloj estas tre interesaj kaj instruaj. N. Bartelmes komencas per leginda kontribuoj *La Franca Revolucio kaj ni*; sekvas S. Aarse per bonega multaĝa funda studo pri la signifo de la granda komponisto G. Verdi, kies precipe multŝatataj operoj formas la ĉiujaran repertuaron de diversaj teatroj kaj orkestroj.

G. Lagrange prezentas vere legindan filozofian artikolon titolitan *Pri moralo sen metafiziko*, dum M. Starr vivigas la preskaŭ forgesitan germanan filozofon J. Dietzgen. M. Erbetta publikigas lernigan kontribuon de opinioj kaj spertoj de diverslandaj pedagogoj pri la de li iniciatita porjunulara gazeto *Grajnoj en Vento*. La japano H. Kosinoka per traduko de artikolo de D-ro Masamici Okŝina reliefigas la problemojn, kiujn frontas la nuntempaj kosmonaŭtoj. Alia japano *Mijamoto Masao* publikigas nekonatan leteron de la S.A.T.-fondinto E. Lanti. Paul Lobut prezentas artikolon pri la franca literaturisto *Lautréamont* kaj fine oni trovas la kutiman artikolon de *Raymond Schwartz* *Laŭ mia . . . Ridpunkto*, miaopinie ĉi-foje malpli spica ol en antaŭaj jaroj. La tuta prezento estas bonega, preskaŭ sen kompost-eraroj. Havinda kajero. P. M.

tiuj rubrikoj estis multe uzataj. Fakte estus plej efike, se ni malabonus tiun gazeton kaj transirus al „Vrije Geluiden” de la V.P.R.O., kiu nun estas la *nura*, kiu detale informas pri la Esperanto-elsendoj. Ĝia adreso estas: Postbus 11, Hilversum. Ankaŭ al la estraroj de la N.C.R.V. kaj V.A.R.A. oni direktu sin pro la ĉesigo de la Esperanto-elsendoj, por ke ili sciu, ke estis multaj aŭskultantoj. Nepre skribu nederlandlingve.

Ni ankaŭ kontaktis kun la nova „Troskompas”, sed pro la relative malgranda amplekso de tiu gazeto oni ne povis plenumi nian peton. W. Böttcher.

FAKTOJ PRI GERMANUJO de Helmut Arntz. Tria ĝisdate aktualigita eldono. Eld. de la Gazetara kaj Informa Oficejo de la Federacia Registaro de Germanujo. 21 x 15 cm, 94 paĝoj, il. Unuopa ekz. estas senpage ricevebla ĉe: INTER NATIONES, Referat Information, Kennedyallee 91-103, D 532 BAD GODESBERG, Germanujo. La poekzemplera prezo por pli grandaj kvantoj estas 4,— g.m. aŭ 1 dolaro. Mendojn oni direktu al la sama adreso.

Ĉi tiu verko donas abundon da informoj pri ĉiuj aspektoj de la vivo en Okcident-Germanujo. Ĝi indas esti konsultata de ĉiu, kiu havas intereson por ĉi tiu lando aŭ kiu laŭprofesie devas scii faktojn pri politiko, ekonomio, sociala vivo, edukado k.t.p. Bona registro helpas ĉe la konsultado.

H. G.

JARLIBRO DE U.E.A. 1966. Dua parto Nur por uzo de membroj. Eld. de UEA, Rotterdam. 64 p.

Multe pli frue ol en antaŭaj jaroj ni ricevis la duan parton de la Jarlibro de UEA. La kaŭzo estas, ke la jaro 1965 finiĝis kun granda deficito. Aperigante la duan parton antaŭ la Universala Kongreso la estraro evitis apartan presigon de la Estrara Raporto por la kongresanoj. Oni krome limigis la amplekson de tiu ĉi eldono. Ne estis eble dediĉi multajn paĝojn al la raporto de la landaj kaj fakaj asocioj. Tamen la Jarlibro restas por ĉiu interesiganto pri la laboro de UEA interesa legaĵo, kun i.a. la Raporto de la estraro de UEA pri la laboro en '65/'66, kaj la Raporto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado.

H. G.

ETERNECO (Navarra legendo) verkita de A. Núñez Dubús. Eldonis Hispana Esperanto-Federacio, Zaragoza (Hispanujo). Formato 11½ x 17 cm, 13 paĝoj. Prezo 10 pesetoj.

La hispana multjara esperantistino Amalia Núñez Dubús rerakontas en versa formo ĉarman legendon el la provinco Navarra (nord-Hispanujo), kies ĉefrolulo estas iu abato Virila kaj kies feston la Romkatolika Eklezio celebras la 10-an de oktobro. La enhavo estas iom filozofia, sed impresas pro simpla naïveco kaj

senpretendeco. Kvankam ne ĉiam senmakula la verkistino sukcesis redoni la enhavon en bona versa ritmo, kiu montras ŝian konon de la internacia lingvo. Pro la simpla stilo bonega legaĵo por komencantoj, eldonita okaze de la Hispana Kongreso en Bilbao. La prezento estas bonega.

P. M.

RAKONTU, SAMIDEANO, spertoj de diverslandaj esperantistoj originale verkita en Esperanto. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, Danlando. Formato 15 x 21 cm, broŝurita, 70 paĝoj. Prezo 7,50 dkr. Mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

La diligenta dana eldonejo, precipe konata pro siaj bonaj lernolibroj, komencis en 1964 la publikigon de verko sub la ŝablona titolo *Sub la signo de la verda stelo* (vidu N.E. 1965 paĝo 8). Temis pri kolekto de interesaĵoj el la vivo de diverslandaj esperantistoj. La celo estis montri al la cetera mondo la neceson kaj taŭgecon de la internacia lingvo. Evidente la eldono estis sukceso kaj cetera la eldonejo disponis pri pliaj kontribuoj. Tial ĝi decidis daŭrigi la serion per eldono de dua verko sub la imperativa titolo menciita ĉi-supre. Oni povas legi diversajn travivaĵojn, kiuj por spertaj esperantistoj estas memevidentaj kaj ne sensaciaj, tamen povas esti por komencantoj instruaj kaj instigaj. Unu el la kontribuantoj estas nia ano s-ro P. Hendriks, Leeuwarden. La verko estas lingve kontrolita de la Literatura Komitato de S.A.T. (kiuj formas tiun komitaton?) kaj eble pro tio (?) la stilo estas iom monotona. Facila legaĵo por komencantoj kaj grupvesperoj. Prezento, kiel kutime de tiu eldonejo, bonega.

P. M.

MODERNA ESPERANTO, the international scientific language, by Teodoro Lahago. English version. Libreto en la angla lingvo, 56-paĝa, 15½ x 23½ cm. Prezo ne montrita. Eld.: „Moderna Esperanto”, P.O. Box 3846, North Las Vegas, Nevada, U.S.A.

Jen libreto kiun ni jam dum preskaŭ 80 jaroj sopire atendis! Dum tiu longa tempo ni, esperantistoj, devis kontentiĝi pri la malnova formo de internacia lingvo, projektita de Zamenhof. La aŭtoro de tiu

ĉi libreto bonvolis transformi tiun lingvon, donante al ĝi modernan aspekton. Supozeble li estas konvinkita, ke ni ĝoje akceptos lian modernigitan lingvon.

Sed nun serioze: ĉu la aŭtoro pense ankoraŭ vivas en la „infana periodo” de Esperanto, kiam pluraj novaj adeptoj opiniis, ke Esperanto en sia formo donita de Zamenhof, ne kontentigas niajn bezonojn? Ĉu li efektive revas, ke la esperantistoj ĝoje bonvenigos lian „modernigitan” projekton?

En kio konsistas liaj reformoj? Unuavice li kompreneble forigis la supersignitajn literojn: ankaŭ la literojn *c*, *f* kaj *z* li opiniis superflujaj. Novaĵo estas la nedifina artikolo *un*. La pluralan *j* postulas nur la substantivoj. Multaj vortoj aperas en nova formo. Pri pluraj aliaj reformoj (legu: kripligoj) ni prefere silentu.

Evidente por fari bonan impreson la libreto prezentas unue la konatan leteron de Zamenhof al Borovko (la aŭtoro skribas Borovsko!). Sekvas artikolo pri Zamenhof. Post siaj gramatikaj pritraktoj - en kiuj li faris diversajn erarojn! - Teodoro Lahago (Teddy Hagenaar) dediĉas kvar plenajn paĝojn al sia propra biografio, en kiu la sola por ni interesa fakto estas ke li lernis Esperanton jam (!) inter 1953-a kaj 1958-a, en kiu tempo li konvinkiĝis pri la „netaŭgeco” de la lingvo en ĝia nuna formo.

La subtitola indiko „English version” supozigas, ke aperos ankoraŭ eldonoj en aliaj lingvoj. Li ŝparu la tiucele forjetotan monon. Esperanto ne estas ludilo por homoj disnantaj pri tro da tempo kaj mono!

G. J. Degenkamp.

PAULO KAJ STEFANO de Francisco Candido Xavier. *Historia romano* diktita de la Spirito EMMANUEL. *El la portugala lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto* laŭ la 7-a eldono. 13½ x 18½ cm, 540 p. *Glosaro, broŝurita. Eld. Federação E. Brasileira, Av. Passos, 30 - Rio de Janeiro, Gb - ZC-58, BRAZILIO. Prezo ne indikita.*

La aŭtoro estas mediumo; laŭ la titolpaĝo li verkis ĉi tiun libron diktate de la spirito Emmanuel. Ĝi rakontas la vivojn de Stefano kaj Paŭlo, parte laŭ „La agoj de la apostoloj”, parte (antaŭ ilia agado publika) laŭ la libera fantazio de la aŭtoro (aŭ, laŭ la spiritistoj, laŭ la informoj de Emmanuel).

La unua parto entenas multajn neverŝajnaĵojn, ekz. ke Stefano estis nomita diakono nur kelkajn monatojn post sia kristaniĝo.

En la duan parton la aŭtoro enkondukas kiel ĉefan novan motivon la funkciadon de Stefano kiel ia gardaĝelo de Paŭlo, sed tion ne sukcesas organe interplekti kun la historio de Paŭlo laŭ „La agoj”. Eĉ por nura distro „La agoj” estas preferinda al „Paŭlo kaj Stefano”. „La agoj” estas konciza, sed diras ĉion esencan.

„Paulo kaj Stefano” estas vortriĉa kaj aldonas nenion esencan al la enhavo de „La agoj”.

La traduko estas modela. Ke tia tradukarto estas malŝparita al tia mezvalora libro!

W. A. Verloren van Themaat.

MI AMIS JUNULINON. *Konfidenca korespondado, publicita de Walter Trobisch, Lange Strasse 50, D-757 BADEN-BADEN, Germanujo. Esperanto-traduko de pastoro Adolf Burkhardt, 12 x 18 cm, 140 p. Prezo bindita DM 8,—, broŝurita DM 6,—. Mendebila ĉe nia Libroservo. Originala franclingva eldono: „J'ai aimé une fille”, eld. de la sama eldonejo.*

Walter Trobisch, la aŭtoro de tiu ĉi libro, naskiĝis en 1923 en Leipzig, Germanujo. Li studis teologion kaj ekde 1953 li laboris en Afriko, precipe en Kameruno, unue kiel pastoro ĉe la Fulani-popolo, poste de 1957 ĝis 1963 kiel gimnazia profesoro. Li tiam estis ofte petata de junaj homoj doni konsilojn al ili. Ĉi tiu verko entenas la aŭtentikan korespondadon de unuflanke Trobisch kaj lia edzino, kaj aliflanke Francisko kaj lia amatino Cecilja.

La verko donas viglan priskribon pri kiel la du geamantoj eniĝas en grandegajn tensiojn inter la tradicia tria kutimaro kaj la kriterioj - kristanaj kaj okcidentaj - de nova epoko.

Se, dum nur kelkaj jaroj, libro estas tradukita en pli ol 50 lingvoj, kaj se la aŭtoro ricevis pli ol 2000 leterojn de legantoj en 24 landoj, tiam la temo supozeble estas aktuala.

Oni konsciu, ke la aŭtoro en siaj konsiloj al la geamantoj sin bazas sur sia kristana kredo.

Certe unu el la plej gravaj verkoj, lastatempe tradukitaj en Esperanto.

H. G.

SCIINDAĴOJ EL LA HISTORIO DE NIA ASOCIO (VII)

La diversaj kontraŭstaroj grave influis la rilatojn interne de L.E.E.N. kaj rezultis en vere tumultaj jarkunvenoj. En 1934 kelkaj obstinaj sekciaj gvidantoj decidis eklogi siajn grupojn el la asocio, ofte kontraŭ la opinio de grava parto el la koncernaj membraroj. Oni formis propran organizon, nomitan N.E.G. (Nederlanda Esperanto-Gruparo), kiu poste kun „Nederlanda Katoliko” kaj kristana societo fondis novan landan asocion T.E.L. (Tutnederlanda Esperanto-Ligo). Tiu organizo klopodis aliĝi al UEA resp. la tiama I.E.L. kiel landa reprezentanto anstataŭ aŭ eventuale kun L.E.E.N., sed ricevis rifuzan respondon. Kvankam iom post iom en la diversaj lokoj de la eklogintaj grupoj formiĝis novaj sekcioj de L.E.E.N., la skismo kaŭzis membropardon de pli ol 300 personoj, dum diversaj forlasis la asocion pro seniluziĝo.

Tamen malgraŭ tiuj bedaŭrindaj malfacilaĵoj la estraro, sekcioj kaj membraro de L.E.E.N. fervore daŭrigis sian poresperantan laboron.

La administra ĉefestraro kunvenis altern-semajne por gvidi la asocion. Krom s-ro Cseh estis invititaj por gvidi kursojn s-roj Baghy, Pragano, Dupuis, Glück, Bartošik, s-ino Haudebine, f-inoj Marg. Saxl kaj Juliette Baudin, k.t.p. La 29-an de julio 1933 estis inaŭgurita en Bergen op Zoom bela Esperanto-monumento, iniciatita de s-ro Holleman kaj starigita kun mona helpo de la nederlanda esperantistaro. Alian monumenton oni inaŭguris la 10-an de majo 1935 en Den Burg (Tekselo), laŭ ideoj de s-ro Duinker.

Okaze de la komenciĝo de la vintraj studsezonoj aperis specialaj propagandaj numeroj de „Nederlanda Esperantisto” en pli granda eldonkvanto, krome L.E.E.N. presigis kaj divastigis pere de sia membraro multajn propagandajn flugfoliojn (ekz. 250.000 en la aŭtuno de 1935). En la tiel nomita „verda monato” septembro la sekcioj okazigis propagandajn kunvenojn por aranĝi kursojn, cetere ili ofte laŭloke prezentis „verdajn dimanĉojn” kun allogaj programoj invitante aliajn sekciojn al kunlaboro kaj partopreno. Por konigi fremdajn landojn la ĉefestraro aranĝis specialajn vesperojn, kie oni montris filmojn, muzikon kaj krome propagandis Esperanton. Tiel okazis ekz. japana vespero en Amsterdam la 23-an de

majo 1935, kiu ĉeestis la japana ambasadoro kun diversaj japanaj oficialuloj kun edzinoj. Sammaniere en 1936 estis prezentita speciala ĉeĥoslovaka vespero. Pro la 30-jara jubileo de L.E.E.N. s-ro Jan van Schoor verkis specialan poemon „La Estonto Estas Nia”. Oni decidis akcepti ĝin kiel kluban kanton kaj tiucele elektis, post konkurso, la melodion de s-ro Frieso Moolenaar, komponisto en Groningen, kiu cedis sian aŭtoran rajton favore de la asocio. En la jarkunveno kaj en la sekciaj aranĝoj oni regule kantis tiujn instigajn versojn.

Por helpi malgrandajn grupojn L.E.E.N. aĉetis kaj disponigis Linguaphone-kurson Cetere la asocio memstare daŭrigis la viccon de 3-tagaj nederlandaj kongresoj, en kies kadroj okazis la jarkunvenoj. La kutimaj programeroj estis: sabate akcepto fare de la urbestro, interkona vespero kun simpla programo kaj balo; dimanĉe diservo(j), jarkunveno (promenadoj) kaj granda festvespero kun balo; lunde ekskurso kaj adiaŭa aranĝo. Tiuj kongresoj okazis en diversaj lokoj, kie la koncernaj sekcioj laboris preskaŭ tutan jaron por sukcesigi la aranĝojn. Ofte partoprenis pli ol 300 personoj, kiuj ricevis tie novajn instigojn por entuziasme daŭrigi la ĉiutagan poresperantan propagadon. Menciinde estas ke en tiuj antaŭmilitaj kongresoj la ĉefestraranoj portis malhelajn vestojn! Tiuj aranĝoj ricevis pli fortan eksvingon pro la brila kongreso en Leeuwarden en la jaro 1936. Tie oni prezentis elstaran revuon, en kiu ĉefrolis s-ino Haudebine kaj s-ro Kalma, dum multaj geanoj de la Frisa Esperantista Rondo kontribuis al la programo. Tiam ĉeestis i.a. ankaŭ s-ro C. C. Goldsmith, la sekretario de I.E.L. poste denove U.E.A. Laŭ tiu ekzemplo en Leeuwarden disvolviĝis similaj aranĝoj en postaj jaroj (Den Helder, Rotterdam, Amsterdam, Arnhem). En Den Helder ĉeestis s-ro Scherer el Usono, kiu poste en diversaj lokoj parolis pri sia mondvojaĝo, kaj s-ro Hugo Steiner, la fondinto kaj gvidanto de la Esperanto-muzeo en Vieno.

(daŭrigota)

P. M. Mabesoone.

La antaŭaj partoj aperis sinsekve en „N.E.” (1966) de marto, aprilo, majo, junio, julio/aŭgusto kaj septembro.

PUBLIKA LETERO AL F.E.N.

Rilate: komuna Esperanto-gazeto por ĉiuj en via federacio unuiĝintaj Nederlandaj Esperanto-asocioj.

En „Nederlanda Esperantisto” de novembro 1965-a oni komunikis ke:

- 1e. la eldono de speciala studgazeto ne estas ebla pro la financa flanko;
- 2e. la eldono de propagand-gazeto ne estas ebla ĉar la garantia sumo ne estas atingita.

Sed mankis en la raporto la sciigo ĉu oni ankaŭ konsideris la eldonon de unu komuna E.-gazeto en kiu la memstaraj asocioj anoncas siajn asociajn novaĵojn sur kelkaj por ili rezervitaj paĝoj. La gazeto cetere enhavu ĝeneralan parton kaj fine ekzemple 2 paĝojn da studmaterialo. Tia maniere la kostoj de la „stud” parto estas neglekteblaj.

Tia komuna gazeto havas diversajn avantaĝojn:

- 1e. la kostoj po ekzemplero de unu grandnombra gazeto verŝajne ne estas multe pli ol la duono de la nunaj kostoj de la asociaj gazetoj;
- 2e. ĉiuj nederlandaj aliĝintaj Esperantistoj povas konstati kio vivas ne nur en sia propra asocio, sed en la tuta nederlanda Esperantistaro;
- 3e. por la malgrandaj unuiĝoj, kiuj ĝis nun ne havas propran gazeton estos eble partopreni en tiu komuna gazeto je por ili relative malmultaj kostoj.

Se la en via federacio kuniĝintaj unuiĝoj interkonsentas pri la supremenciita propono la ĉefestraroj ne postulu ke la nova gazeto havu la saman formaton, paperon, litertipon k.t.p. kiel sia propra gazeto, sed oni petu al la presejoj kiuj eblas presi E.-gazetojn, la tarivon por la eldono de alloga sur bona papero presita gazeto de paĝoj en kvanto sufiĉa por provizi ĉiujn personojn, unuiĝojn k.t.p. kiuj ĝis nun ricevas asocian gazeton.

En la nunaj jaroj ĉiutage entreprenoj, fabrikoj, institucioj „fuzias” por redukti la kostojn de administrado, reklamo, propagando k.t.p. kaj tiel plifortigi la eblecojn de disvastigado/vendado de siaj ideoj/produktoj. Ĉu ankaŭ por ni, Esperantistoj, ne estas veninta la momento por, -

konservante la memstarecon de la diversaj unuiĝoj, - kunlabori ĉie kie tio estas ebla? Laŭ mia opinio mia propono ne estas afero nur de la ĉefestraroj sed de ĉiuj individuaj Esperantistoj, kaj mi estas konvinkita ke multaj E.oj samopinias kiel mi.

Por ekscii la opinion de la nederlanda esperantistaro necesas ke mia propono estu preparolata en la sekcioj de la diversaj nederlandaj Esperanto-unuiĝoj kaj ke la sekcioj informu siajn ĉefestrarojn pri la rezulto.

Kiam la plimulto de la E.-oj estas „por” mi estas konvinkita ke la ĉefestraroj trovos solvon por ĉi tiu grava problemo.

Oegstgeest, julio 1966-a. H. Valkenburg

La redakcioj de la aliaj nederlandaj asociaj gazetoj estas afable petataj transpreni ĉi tiun leteron. Anticipe koran dankon!

Va.

PAROLAS LĖGANTO

Subskribinto legis en Nederlanda Esperantisto la nekrologon pri S-ro E. de Wolf kaj sciigis ke nekonata estas la preciza dato kiam li esperantistiĝis. S-ro De Wolf kaj mi estis kunkursanoj kaj la kurso, kiun ni partoprenis, komenciĝis en la vintro 1917 kaj daŭris ĝis aŭtuno 1918 interrompita pro ferio. Ni startis 22-ope kaj finis la kurson 8-ope. A.P.K.E. iniciatis la kurson (Amsterdama Propaganda Komitato Esperantista). Tiu komitato estis rezulto de kunlaborantaj kluboj: la unua amsterdama esp. asocio, la laborista asocio, l'Oriento kaj La Progreso. Gvidintoj de l'Oriento estis S-ro Jac. Lem kaj de La Progreso S-ro Delsen, la aliajn mi ne povas rememori.

Kursgvidanto estis S-ro Jac. Lem kaj kunvenejo estis saloneto en „De Leeuw”, Damrak, Amsterdam. Kelkajn monatojn post finiĝo de la kurso ni 8-ope estis kunvokitaj kaj ricevis, post solenaj alparoloj de diversaj klub-prezidantoj, belege de-segnitan ateston, datumitan 13 decembro 1918, kiun mi plenzorge konservis ĝis la hodiaŭa tago.

La komitato funkciis nur mallongan tempon; post 2 jaroj ĝi estis eliminata, eble pro rivaleco inter la kluboj.

B. Hazenberg, Amsterdam.

Taskoj por la Esperanto-Ekzamenoj 1966.

Ĉi-sube ni presigas la taskojn de tiu ĉi jaro por la E-diplomo. En sekvontaj numeroj ni publikigos tiujn por la M- kaj la S-diplomoj.

ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMEN-KOMITATO

E1. Amersfoort, 28 majo 1966.

Traduku (2-a-4-a h.):

La lasta sonĝo de maljuna kverko.

Sur alta deklivo, tute apude de la libera marbordo, staris maljuna kverko, kiu havis la aĝon de ĝuste tricent sesdek kvin jaroj. Sed tiu longa tempo por la arbo ne signifis pli ol tia sama nombro da tagoj por ni homoj. Ni maldormas en la tago, dormas en la nokto kaj havas tiam niajn sonĝojn, sed kun arbo estas alia afero, arbo maldormas en la daŭro de tri sezonoj, kaj nur en la komenco de la vintro ĝi endormiĝas, la vintro estas ĝia dormotempo, ĝia nokto post la longa tago, kiu estas nomata printempo, somero kaj aŭtuno.

Dum multe da varmaj someraj tagoj la unutagaj muŝoj dancis ĉirkaŭ ĝia kapo, vivis, flugis kaj sentis sin feliĉaj; kaj kiam la malgranda estajo momenton ripozis en silenta feliĉo sur unu el la grandaj freŝaj kverkfolioj, tiam la arbo ordinare diradis: „Vi kompatinda malgranda estajo! Nur unu momenton daŭras via tuta vivo! Kiel malĝoje!”

„Malĝoje?” respondadis ordinare la unutaga muŝo, „kion vi pensas per tio? Ĉio estas ja tiel nekompareble luma kaj klara, tiel varma kaj belega kaj mi estas tiel ĝoja!”

„Sed nur unu tagon, kaj poste ĉio estas finita!”

„Finita?” diris la unutaga muŝo. „Kio estas finita? Ĉu vi ankaŭ finiĝas?”

„Ne, mi vivas multajn milojn da viaj tagoj, kaj mia tago ampleksas tutajn sezonojn. Tio estas io tia longa, ke vi tute ne povus tion kalkuli!”

„Ne, ĉar mi vin ne komprenas! Vi havas milojn da miaj tagoj, sed mi havas milojn da sekundoj, en kiuj mi povas esti ĝoja kaj feliĉa! Ĉu ĉiuj belegajoj de la mondo malaperos kiam vi mortos?”

„Ne”, diris la arbo, „la mondo certe ekzistos plue, senfine pli longe, ol kiel mi povas imagi al mi!”

„Sed en tia okazo ni havas ja egalan daŭron de la vivo, sed ni nur malegale kalkulas”.

El: „Fabeloj de Andersen”, 4a volumo.

E2. Amersfoort, 28 majo 1966.

Traduko en Esperanton (10-a—12-a h.):

Aan de heer Juan Cuenco,
MANILA,
PHILIPPINIEN¹⁾.

Waarde geestverwant,

Uw naam heb ik in ons verenigingsblad gelezen en ik wil graag met u korresponderen. Ik ben drie en twintig jaar en ik woon in Alkmaar, een stad in de provincie Noord-Holland. Maar over twee maanden gaan we in Amsterdam, de hoofdstad van ons land, wonen. Amsterdam is een grote stad met meer dan achthonderdduizend inwoners. Vooral de binnenstad is heel mooi met zijn grachten en vele huizen uit de 17e eeuw. De omgeving van Amsterdam is niet zo mooi, althans minder mooi dan bijvoorbeeld de omgeving van Den Haag. De badplaats Scheveningen trekt 's zomers duizenden bezoekers, en niet alleen Nederlanders maar ook veel buitenlanders. Je kunt er Belgen, Duitsers, Fransen en Engelsen ontmoeten en ook heel veel soldaten die tot de Amerikaanse legers in Duitsland behoren²⁾.

Hebt u wel eens andere landen bezocht en hebt u ook internationale Esperanto-kongressen bijgewoond? Ik zou graag naar zo'n kongres willen gaan. Bijvoorbeeld ³⁾ in Tokio. Maar Japan is zo ver weg en de reis daarheen is voor mij te kostbaar. U op de Phillippijnen woont dicht bij Japan, en u gaat er waarschijnlijk wel naar toe, niet? In de afgelopen winter hebben wij veel geschaatst, wat in een warm land zoals het uwe nooit mogelijk is. Ik ging meestal met een aantal vrienden, soms met z'n achten en dan reden we twee aan twee. Het was helemaal niet gevaarlijk, want het ijs was dik en sterk en bovendien was het water daar niet diep. Zeker niet meer dan een

LIBRO - SERVO L. E. E. N.

Aperis disko kun
ESPERANTOMARŜO
 kaj
SUB LA VERDA STANDARDO
 luditaj de la
 Reĝa Militista Orkestro (K.M.K.)
 Prezo f 4,25

Havigu ĉi tiun belan diskon por via diskoteko, donacu ĝin al viaj amikoj. Mendu ĝin ĉe via Libro-servo, Borniastraat 95, Leeuwarden.

halve meter. We hadden in elk geval heel veel plezier.

Nu, mijnheer Cuenco, schrijft u spoedig eens een brief terug aan uw Nederlandse vriend?

Henk.

- 1) = Filipinaj insuloj.
 2) = apartenas.
 3) = ekzemple.

E3. Diktaĵo.

1. Vojaĝantoj en dezertoj ofte pereas pro soifo kaj iuj eĉ freneziĝas pro la infera varmego.
2. Ĉe la elirejo de la stacidomo multego da homoj interpuŝiĝis, ĉar ĉiuj urĝis por atingi la atendantajn tramveturilojn.
3. Antaŭhieraŭ mi ricevis poŝtajon ŝarĝitan per punafranko.
4. La ekspedinto ne ĝustatempe informiĝis pri la plialtigitaj tarifoj.
5. Dum inaŭgura soleno ĉiuj ĉeestantoj portas ceremonian veston.
6. La festa vesto de la viroj kutime estas funebre nigra.
7. Oni tamen sciuj, ke ĉe la ĉinoj la koloro de la funebro estas blanka.

KONCIZE**Grava artikolo pri Esperanto.**

En la konata revuo pri fremdlingva instruado „Modern Languages”, parto XLVI, 4, aperis artikolo de D. B. Gregor: „The cultural value of Esperanto” (La kultura valoro de Esperanto).

Azio malsatas - ankaŭ je libroj.

La evoluantaj landoj de Azio havas nur ĉirkaŭ duonon de la kvanto da libroj, kiun ili bezonas ĉiujare. Edukaj libroj estas aparte akra problemo, ĉar mankas pli ol du trionoj de la bezonata kvanto da lernolibroj. Krome, la libro-bezonoj de Azio ege kreskos pro la plua grandigo de la loĝantaroj kaj pro la novaj legantoj, kiujn kreas la planata vastigo de edukado kaj la kampanjoj kontraŭ analfabeteco. Laŭ la nombro de titoloj eldonitaj en 1964, 18 aziaj landoj kune produktas nur ĉ. 7% de la libroj de la tuta mondo, kvankam ilia suma loĝantaro ampleksas ĉ. 28% de la homaro. Laŭ la nombro de ekzempleroj la sama regiono produktas nur 2,6% de la tutmonda kvanto. La meza eldonnombro estas 4300. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Ni ricevis:

AGRIKULTURA BULTENO, n-ro 2/3, 1965. Stencilita. Eld.: Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj - Esperantistoj (ILASE). Red.: ul. Oboriste 15, PEŠTERA, Burgario. Jarabono 1 bulg. levo aŭ egalvaloro.

BAMBERG. *Ilustrita faldfolio. Ricevbla ĉe: Städtisches Verkehrsamt, 86 BAMBERG, Germanujo. Ankaŭ ĉe: Esperanto-Gruppe, Untere Sandstr. 4, 86 BAMBERG, Germ.*

Bele ilustrita faldfolio pri urbo en kiu estas konservitaj multaj historiaj vidindaĵoj. La enmetita Esperanto-teksto donas valorajn informojn pri hoteloj, k.t.p.

IOE GAZETO. Organo de Instituto por Oficialigo de Esperanto. Jaro 1, n-ro 1, junio 1966. Presita. Abonprezo: 2 usonaj dol. aŭ egalvaloro. Oni sendu al s-ro Hans Grossmann, Poststr. 2, CH-2500 BIEL, Svislando.

